

Heinrich Heine,  
Lorelej

*tradukita de Ludwig  
Lazarus Zamenhof*

Heinrich Heine,  
Lorelej'

*tradukita de Leopold  
Elb*

Heinrich Heine,  
Lurleia

*tradukita de N. N. 01*

Heinrich Heine,  
Lorelejo

*tradukita de Joachim  
Gießner*

*Tiu traduko estas poste iom modifita de aliujoj, ne estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.*

Ne scias mi, kial subita  
malgaj' en la koro naskiĝis;  
el tempo jam enterigita  
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,  
la Rejno mallaŭte babilas,  
per oro de l'sun' en vespero  
la supro de l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vidas:  
en ora ornamo brilante,  
sur supro de l' monto ŝi sidas,  
la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas  
kaj kantas tra l' pura aero,  
kaj forto mirinda sin trovas  
en tiu ĉi kant' de l'vespero.

...

Ne scias mi, kial mi estas  
Malgaja en la kor'.  
Antikva fabelo restas  
Por ĉiam en mia memor'.

Vespero jam ekmalheliĝas,  
Fluadas la Rejn' en trankvil',  
La supro de l' monto lumiĝas  
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen tronas  
Kun ora juvelar',  
La belan vizaĝon kronas  
Mirinde la ora harar'.

Ŝi uzas kombilon el oro  
Kaj dume kantas ŝi.  
Mirige tuŝas al koro  
Sorĉiga la melodi'.

...

Ignoro, quid id sibi velit,  
Tristissimus cur sim,  
Antiqui aevi fabellam  
Cur saepe volverim.

Vesperascit et frigescit,  
Et Rhenus leniter it,  
Cacumen montis lurescit,  
Dum Phoebus occidit.

Sedet in summo montis  
Virgo pulcherrima,  
Auro nitet gemma frontis,  
Se pectit auricoma.

Aureolo pectine pectit,  
Carmen canens procul,  
Mirandum id habet modum  
Nec non virilem simul.

...

Malgajon mi sentas en koro,  
sed kial tia tim'?  
Legendo el pratempa foro  
Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en malhelo,  
kaj malvarmetas l' aer'.  
Sed brilas la mont' en orbelo  
pro suna lum' de l' vesper'.

Jen supre kabino provokas  
per ora juvelar',  
kaj ŝia beleco allogas  
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas sorĉige,  
sirene kantas ŝi  
per neimagebla, mirige  
potenca melodi'.

...

Ŝipet' iras sur la rivero, ŝipisto ekstremis de l' kanto, kaj blinda por ĉiu danĝero rigardas li al la kantan- to.	Kaj sopiregon eksen- tas Ŝipisto dum sia vetur'; Rifaron li ne priaten- tas, Al monto rigardas li nur.	In cymba navitam mille Angores feri tenent, Non videt scopulos il- le, Ocli non si sursum vi- dent.	Ŝipiston en eta boato Turmentas koremoci'. Ne ĝenas lin rifo- kaskado, rigardas nur supren al ŝi!
--	--	---	--

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela perdiĝis sub l' akvotur- nado; ĝin Lorelej' faris krue- la, per sia mirinda kanta- do.	Mi kredas, ke dronos finfine Ŝipisto kun sia boat', Kaj tion kaŭzis feine La Loreleja kantad'.	Opinor undas de- vorare Nautam cum navicu- la, Effecit solo canendo Lurleia id dea.	Ĝis tiras kun si al Rejn- fundo la ondoj lin kun boat'. Nun kuŝas li en la pro- fundo pro Loreleja kantad'.
--	--	--	--

*Traduko de la Germa-  
na poemo "Die Lore-  
lei" de HEINRICH HEINE  
(\*1797-12-13 - †1856-  
02-17) en Esperanton de  
LUDWIG LAZARUS ZA-  
MENHOF (Ludoviko La-  
zaro Zamenhofo, \*1859-  
12-15 - †1917-04-14).*

*Arg-2-565 (2009-10-30  
16:15:09)*

*Tiun ĉi tradukversion mi  
prenis el retejo <http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html>.*

*Traduko de la Germa-  
na poemo "Die Lore-  
lei" de HEINRICH HEINE  
(\*1797-12-13 - †1856-  
02-17) en Esperanton de  
LEOPOLD ELB (†1912-  
08.04).*

*Arg-2-71 (2005-02-03  
19:06:30)*

*La traduko troviĝas sur  
paĝo 84 de la lernoli-  
bro „Post la kurso“ de  
Wilhelm kaj Hans Win-  
gen, eldonita de Lud-  
wig Pickel en Nurember-  
go (Nürnberg), Germa-  
nio.*

*Traduko de la Germa-  
na poemo "Die Lorelei"  
de HEINRICH HEINE  
(\*1797-12-13 - †1856-  
02-17) en la Latinan de  
N. N. 01.*

*Arg-2-179 (2010-02-11  
14:00:52)*

*Traduko de la Germana  
poemo "Die Lorelei"  
de HEINRICH HEINE  
(\*1797-12-13 - †1856-  
02-17) en Esperanton  
de JOACHIM GIESSNER  
(\*1913-12-23 - †2003-  
11-25).*

*Arg-2-1115 (2010-09-15  
12:51:51)*

*Tiu ĉi poem-traduko  
aperis en la kant-kolekto  
"Mia kantaro I", eldonita  
de Josef Schiffer (Wil-  
storfstr. 58, D-78050  
Villingen-Schwenningen,  
Germanio, tel.  
0049(0)7721-58991;  
faks. 0049(0)7721-  
508891, ret-adreso:  
Josef.Schiffer@  
t-online.de ), n-ro  
30. Krome ĝi aperis en  
la informilo "Fervoja Es-  
perantisto" de Germana  
Ferjojista Esperanto-  
Asocio, n-ro 3/2010, sur  
paĝo3.*